# *Pastroj por Paco ripetas solidarecon kun Kubo*

Image not found or type unknown

**foto: PL**

Havano, jul 30 (RHK) La membroj de la Karavano Pastroj por Paco ripetis sian sindevontigon al solidareco kun la insulanoj, en la evento por la 30-a datreveno de la karavanoj, okazinta en la sidejo de la Kuba Instituto de Amikeco kun la Popoloj (ICAP).

Gail Walker, plenuma direktoro de tiu solidara projekto, en la ?efaj vortoj de la ceremonio atentigis, ke multaj el tiuj, kiuj voja?is al Kubo en la unuaj karavanoj, ne plu estas ?i tie, sed anstata? ili hodia? estas multaj junuloj, kiuj tiam ne naski?is , kio konfirmas la kontinuecon de tiu klopodo.

?i emfazis la gravecon festi ?i tiun 30-an datrevenon kun la partopreno de membroj de Pastroj por Paco kaj la Brigado Venceremos, du el la plej elstaraj solidarecaj movadoj kun Kubo en Usono.

Walker emfazis, ke tio, kion ni faris, kion ni faras kaj kion ni da?re faros, montras, ke ?i povas esti farita! kaj emfazis, ke "ni estos kun la kuba popolo, kio ajn okazos."
Nome de ICAP, ?ia prezidanto, Fernando González Llort, memorigis, ke kiam la malapero de la socialismo en E?ropo ka?zis profundan ekonomian krizon en Kubo, Usono vetis pri la falo de la Revolucio.

Tamen, li aldonis, Pastro Lucius Walker, fondinto de Pastroj por Paco, subtenis Kubon kaj la batalon kontra? la usona blokado en kio estis "unu el la plej konstantaj kaj sinceraj montroj de solidareco" kun la kuba popolo de la insulo.

La XXXII-a Karavano de Pastroj por Paco, finas morga? alian restadon en Kubo dum kiu ?iaj membroj konkretigis la solidarecon inter la du popoloj kaj eksciis propraokule la realon de la kariba nacio.

Fonto:PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/295072-pastroj-por-paco-ripetas-solidarecon-kun-kubo

**Radio Habana Cuba**